



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2015 (204)

18. 6. 2015

Traduka printempo, leganta somero



En aprilo kaj en majo okazis en la praga klubo la agado „Traduka printempo“. Kelkaj volontuloj de nia klubo kaj aliaj esperantistoj (eĉ unu eksterlanda) tradukis por la Bulteno diversajn tekstojn, por ke niaj legantoj havu somere interesan kaj

agrablan legadon. Ili tradukis tekstojn de Rajko Doleček, Jan Vodňanský, Vladimír Dvořák, Marek Skřipský kaj unu ŝercon de Miloš Zeman. La redakcio deziras al ĉiuj legantoj belan kaj ĝojplenan someron!

† *La 6-an de junio forpasis nia multjara prezidanto, aktivulo kaj redaktoro de la Bulteno Jiří Patera (legu pli sur paĝo 2).*

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
Rajko Doleček retrospektas.....	4
Inspektoro Jan Rádl.....	7
Prelego pri la temo: difino de lito.....	10
Kofro malantaŭ la pordo.....	12
Se mi elble ne revenus (J. Karen).....	14
La tilio de saĝeco (V. Ludíková)	18
La blazono de Prago (J. Patera).....	20

Klub esperantistů v Praze

bulteno.cs-retromusic.net

Schůzky v ul. Ve Smečkách 25
ve vybrané čtvrtky od 17 do 19 h.

Bulteno

redaktor: Tomáš Břicháček

t.brichacek@seznam.cz

Koran dankon al Pavol Petřík pro lingvaj korektoj.

Zemřel Jiří Patera



Se smutkem oznamujeme, že 6. června 2015 ve věku 79 let zemřel dlouholetý předseda a činovník našeho klubu a čestný člen ČES Jiří Patera.

Jiří Patera se narodil 18. srpna 1935. Dlouhá léta žil v Mostě. Do Prahy se přistěhoval roku 1977 a od počátku se angažoval v našem klubu. V letech 1994 až 2003 a 2010 až 2012 byl jeho předsedou. V letech 2000 až 2013 byl pilným redaktorem klubového časopisu Bulteno.

Pohřeb se konal dne 11. června ve strašnickém krematoriu za účasti řady esperantistů. Jejich jménem zde promluvila paní Ing. Margit Turková, která přečetla slova Věry Ludíkové:

„S lítostí jsem přijala zprávu o úmrtí pana Jiřího Patery a mohu říci, že mě zaskočila. Právě jemu jsem velmi vděčná za překlady mých básní a textů do esperanta, které poté zařazoval do Bultena. Ráda jsem vidala jeho tvář jako návštěvníka autorských čtení mých knížek, zvláště těch, při nichž zaznívalo esperanto.

Lidé, kterých jsme si velmi vážili, nás opouštějí a nechávají po sobě prázdné místo, avšak jen zdánlivě... Zlomená lodyha jejich života se skláněla níž a níž, až úplně splyne se zemí. Jejich duše však bude obývat prostor někde vysoko nad zemí, bude přebývat ve sférách duchovních, aby mohla chránit své blízké, aby mohla být oporou svým přátelům, aby mohla být stále s námi...“

Přítomní esperantisté křesťané v tichosti pronesli modlitbu „Patro nia“.


Příští číslo Bultena se bude osobnosti Jiřího Patery podrobněji věnovat. Žádáme proto všechny čtenáře, kteří mají na pana Pateru osobní vzpomínky, o které by se chtěli podělit, aby svoje komentáře zaslali na adresu t.brighacek@seznam.cz.

El Vikipedio:

Unue membro de la klubo en Most, poste multajn jarojn en la Esperantista Klubo en Prago, kie li nun funkciis kiel prezidanto ĝis 2002 kaj ekde 2010 denove. Lia merito estas, ke regule aperadas Bulteno de la praga klubo. Kelke da jaroj li estis ankaŭ membro de la komitato de ĈEA. Ses jarojn li redaktis la asocian revuon "Starto". Liaj leteroj ofte aperas ankaŭ en alilandaj revuoj (Monato, La Gazeto kaj aliaj.

Krom la menciitaj funkcioj en la Klubo kaj la Asocio, ludas s-ano Patera gravan rolon sur la kampo de tradukado el kaj en Esperanton. Oni povas mencii tradukon de la duono de rakontoj el la libro "Ne nur soldato Ŝvejk" kaj longan vicon da tradukaĵoj aperigataj ekz. en la praga Bulteno kaj aliloke.

Gastronomia vortaro ĉeĥa-esperanta



Nia membrino Margit Turková kun s-ino Marie Ribasová preparis libreton pri gastronomia terminaro.

Laŭ Starto: *Estiĝis 33-paĝa verketo de formato A5 dividita laŭ ĉapitroj: preparo de manĝoj, vazaro kaj kuirhelpiloj, krudaĵoj, manĝoj, trinkaĵoj. La krudaĵoj estas dividitaj je bazaj krudaĵoj, legumenoj kaj cerealoj, legomoj kaj fruktoj, spicaj kaj aromaj*

herboj. Kompreneble la plej ampleksan parton okupas la manĝoj mem: antaŭmanĝoj kaj salatoj, supoj, saŭcoj, viandaj manĝoj, senviandaj manĝoj, garnaĵoj, farunaĵoj kaj desertoj. Ne mankas desegnoj de bestaj korpoj kun la nomoj de la unuopaj viando-partoj kaj tabelo de nocio-sistemo de knedbuloj laŭ la ĉeĥa kuirarto.

Pluajn informojn petu ĉe Margit Turková margit.turkova@email.cz.

Venontaj aranĝoj

26-28/06/2015 okazos la E-mentala gastronomia aranĝo Viando en Chotýčany

11-19/07/2015 okazos Somera Esperanto-Studado en Martin (SK)

16-18/10/2015 okazos Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo en Nová Paka

Kunvenoj ekde septembro

SEPTEMBRO: la 10-an kaj la 24-an **Září:** 10. a 24.

OKTOBRO: la 8-an kaj la 22-an **Říjen:** 8. a 10.


NOVEMBRO: la 5-an kaj la 19-an **Listopad:** 5. a 19.

DECEMBRO: la 3-an kaj la 17-an **Prosinec:** 3. a 17.

Kunvenoj komenciĝas je la 17-a horo *Začátek vždy v 17 hod.*

Programo de la kunvenoj estos prezentata en niaj interretaj paĝoj <http://bulteno.cs-retromusic.net/>.

Rajko Doleček retrospektas



En novembro 2014 aperis tre interesa memuara libro de la fama ĉeĥa-serba kuracisto Rajko Doleček (*1925) *Inventura v 89 letech – Ve stínu Balkánu*.

Jen du mallongaj fragmentoj:

Serbiaj radikoj

Mia patro devenis el malgranda vilaĝo *Mistrovice u Jabloného nad Orlicí* en bela pejzaĝo ĉe *Orlice*. La geavoj posedis malgrandan bienon kaj havis tri filojn. La plej aĝa estis Josef – mia patro kaj la sekvaj estis Jeník kaj Lojza kaj la filino Mařenka. Josef en lernejo bone progresis kaj post konsilo ĉe paroĥestro gepatroj sendis Josefon studi, sed tio ne estis por la familio facila afero. La avo kaj avino estis piuloj, sed ne sanktafektaj. La

patro estis kutimiĝinta al modesta vivo, mono ĉiam mankis, pro tio la patro dum gimnaziaj jaroj iom perlaboradis kaj ĉefe instruis malplikapablajn lernantojn. Tamen li partoprenis eĉ studentan vivon. Kiel plejparto de junularo li opiniis pri serboj kaj montenegroj kiel modelo de kuraĝo kaj honesto. Li admiris la pentriston *Čermák* kaj liajn bildojn pri Montenegro. Li legis ĉion, kion pri la montenegra lando verkis *Josef Holeček* kaj *Marko Miljanov* estis lia modelo. Li tre aprezis la reĝon Petron. Jam kiel studento li admiris *Masaryk*-on. Pri tiuj pasintaj jaroj ni kun patro multe rakontis kaj mia patrino Milica la parolon kompletigis, ĉar ŝi estis serbino. La gepatroj ĝojis, ke en mi ili trovis atenteman aŭskultanton kaj ke miaj opinioj estis konkordaj kun iliaj. En tiu tempo mi sentis min kiel ĝusta ĉeĥo kaj samtempe ĝusta serbo kaj tiel restis eĉ nun, kiam mi estas 89-jara.

Ĉio komenciĝis en la jaro 1914, kiam komenciĝis la unua mondmilito per atako de la Aŭstra-Hungara imperio. Mia patro ĵus preparis sin por fini la studadon, mankis ankoraŭ unu ŝtata ekzameno por estiĝi inĝeniero. Li devis eksoldatiĝi al Tersto en oficiran lernejon kaj poste al *Boko Kotora*, kiu estis bombita de monto *Lovĉeno*. La monto pintis el la maro ĝis alteco de 1479 metroj. Dum niaj familiaj vizitoj post dekoj da jaroj en tiuj lokoj mi eksciis pri la eventoj, kiam la patro vidis la unuajn mortulojn, kie montenegraj grenatoj detruadis aŭstrajn poziciojn, kiel ŝiparo de aŭstroj estis blokita en *Boko Kotora*, inkluzive de ŝipo *Viribus Unitis*. Sur la libera maro ilin atendis la pli grava danĝero de montenegra armeo. La patro sian soldatan edukadon finis en la urbo *Sarajevo*. La urbo tuŝis lian koron pro belega naturo, montoj pli altaj ol 2000 metroj ĉirkaŭitaj la urbon kaj la rivero *Miljaka* fluanta meze.

Tio, kio donacis al *Sarajevo* ĉarman sorĉon, estis ĉeesto de ia simboleco, ofte eĉ dolora kunmeto de okcidento kaj oriento, kie apud si vivis katolika preĝejo kun islama sanktejo *dĵamio* kun alta svelta minareto. Kaj poste post alveno en *ŝeher Sarajevo* (granda urbo) surprizis vokado al preĝado de *muezino*. La preĝoj dum la tago estas kvin: matene ĉe sunleviĝo *sabah*, tagmeze *podne*, posttagmeza *lkindija*, dum sunmalleviĝo *akŝam* kaj nokte *jacija*. La *akŝam* pleje kortuŝis la patron. Li kun patrino ofte rakontis al mi, ĉe vinglaso, kiel sur sarajevaj stratetoj diskuras ombroj kaj ĉio ricevas nuancon de nekredebleco. Maljunaj sarajevanoj *sarajlije* laŭ la preĝoj regis sian tempon. Se iu diris: „Mi venos al vi post *akŝam*!“ estis klare, je kiu horo oni proksimume venos. Kaj la mezurado de la tempo estis aŭdita el kelkaj minaretoj, de kiuj muezinoj vokadis la *ezanon*: „Ne ekzistas dio, krom Dio kaj Mahometo estas lia profeto!“

En la urbo Sarajevo troviĝas multaj islamaj tombejoj, grandaj kaj malpligrandaj tombejetoj kun sveltaj blankaj tomboŝtonoj *niŝanoj*, kiuj kvazaŭ prilumas noktan lunan malhelon.

La patro estis muzike talenta kaj interesis lin orientaj melodiaj kantoj, kiujn li ĉiun tagon aŭskultis ankaŭ kun sonoj de diversaj instrumentoj, ĉu simplaj violonoj aŭ tamburetoj *defu* kaj *daŭru*, aŭ trumpetoj *zurli*. La kantojn oni nomis *sevdalinko*, laŭ la vorto *sevdah*, kiu signifas amo aŭ amrevo. Tiuj kantoj naskiĝis en la bosnia urbeto *Kasaba*, kie ĉe kristanoj kaj ĉe islamanoj regis severaj patriarkaj leĝoj, kie knabinoj kaj ilia tuta mondo estis fermitaj en domoj kaj internaj kortoj kaj ombraj ĝardenoj, kie la fenestroj estis ekipitaj per fortaj kradoj *demir pendĵer*, kie amindumaj revoj estis ofte akompanataj per revmalsanoj kaj la amo estis akompanata per turmento kun dolĉa sonĝo kaj nepra sorto. En tiu ĉi loko naskiĝis kiel fajro *sevdalinko*, kiel elkrio kaj elstreĉo de la martirita animo. Tiuj kantoj ankaŭ rakontas pri la ordinara vivo, pri svato, edzofestoj, perdo de amatino, pensoj de *aga* – riĉa sinjoro, aŭ pri komizo *bazarĵan Mustafa* el *Mostar*, kiu delogis la knabinon *Fata*-n, kiel riĉa sinjorino, vidvino el *Banja Luka* ne volis edziniĝi al estimata *kadio*, sed elektis konatan kokrulon *bekriu*.

Per ilo de venĝo.

Ĉu vi jam spertis esti ilo de venĝo? Povas okazi, ke tio povas esti iam eble eĉ interesa, sensanga, eĉ iel agrabla, neordinara. Dependas, ĉu la „venĝo“ devas esti je io, kontraŭ iu, kaj kiel oni realigus ĝin.

Antaŭ ĉirkaŭ kvindek jaroj mi rolis en tiu ĉi afero la unuan fojon, tre neatendite. Nur post la okazo mi eksciis, ke mi mem estis la „ilo“. Sed mi devas konfesi, ke mi eĉ ŝate pri tio rememoras. Eble tio okazis ne sen peko, sed mia sento pri tio estis edifa.

Estis vintra semajnfino en la tempo de la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento. Mi laboris kiel kuracisto en regiona polikliniko en la urbo Ostrava. En tiu tempo oni sabate ankoraŭ laboris, sed ofte laboristoj foriradis el la laborejo jam je la dekunua horo. Hastite mi kaptis la trajnon al *Frenštát*, sekve buson kaj telferon kaj poste mi iris piede al la hoteleto *Skalička*. Ĉie estis abunde da neĝo kaj nur kelkaj skiantoj. Mi planis sola skii per miaj malnovaj skioj kaj neglora sperteco. Mi rapide okupis ĉambreton en la hotelo kaj tuj ekiris eksteren kun la skioj. La

homoj ne estis multnombraj kaj mi preskaŭ sendifekte skiis malsupren. Malsupre staris kelkaj homoj ĉirkaŭ skiistino, kiu falis mallerte profunden en neĝon. Kun intereso mi gapis al ŝia bela vizaĝo, tamen pro malagrablo iel grimacita. Ŝia amiko? edzo? laŭte insultis al ŝi. Ĝis nun mi klare rememoras kiel li kriaĉis: „...vi bovino!“ Kaj neniu el la grupeto helpis ŝin starigi. Mi estis konsternita. Tiuj homoj estis ŝajne ebriaj. Mi kondukis kiel kavaliro, oportune mi skiis al ŝi (mi ne falis) kaj kun dolĉa voĉo mi demandis: „Ĉu mi povas al vi helpi?“ Ŝi ekrigardis min kaj kun mia helpo stariĝis kaj per melodia vorto diris: „Dankon!“ Kaj ne tre sperte tuj forveturis post sia grupeto.

Post unu kaj duono da horo mi revenis al la hoteleto *Skalička* laŭ mallarĝa vojeto per milda dekliveto. La tago malheliĝadis. Proksime de la enirejo mi vidis mian „damon“ kaj tiu ĉi viro denove alparoladis ŝin malbele. Ŝia vizaĝo radiis indignecon kaj larmoj preskaŭ aperadis. La viraĉo eniris restoracion post la grupeto kaj lasis ŝin kuŝi. Post kelkaj sekundoj mi estis ĉe ŝi, mi helpis ŝin stariĝi. Ŝi preskaŭ ĝoje per escepta rigardo plena de tenero, de promeso dankis al mi. Ŝi estis vere bela, eble tridekjara. Ŝia korpo estis emociplena. Ŝi tre plaĉis al mi. Kaj mi ne sciis kiel tio okazis, mi diris al ŝi: „Ĉu vi deziras veni al mia ĉambro en la unua etaĝo numero...?“

Ŝi longe denove ekrigardis min kun ŝato eĉ pasio, eble tenero, aŭ io simila. „Mi venos, nur mi revestos min. La edzo drinkos kun kamaradoj longe.“

Ŝi venis post duonhoreto bela, ekscita, fajne odoris. Mia koro ekbatis forte. Ni ne prezentis unu al la alia, sed tuj ni ekbrakumis kaj kisis unu la alian. Ŝi alpremiĝis al mi kaj helpis al mi demeti veston kaj mi helpis al ŝi. En la ĉambro estis agrable varme. Tiujn momentojn mi klare memoras ĝis nun, post kvindek jaroj.

„Ni havas horon da tempo,“ ŝi diris esperige inter kizado.

Kiam ŝi estis foriranta, ŝi delikate karesis min sur la vango kaj estis videbla ŝia interna kontentiĝo, tenero, eble amo. „Mi dankas al vi tre, vi eĉ ne scias, kiel vi helpis al mi!“ tion simile ŝi diris al mi.“

Neniam ni renkontiĝis plu. Mi ne scias ŝian nomon. Mi esperis, ke ŝi mem trovos min post jaroj, kiam mi jam estis la plej fama kuracisto en Ĉeĥoslovakio dum la sepdekaj jaroj kaj tre ŝatataj estis miaj prezentadoj en televido: „Danĝera mondo de kalorioj“ kaj diversaj aliaj medicinaj elsendoj. Ŝi silentis. Domaĝe. La horeto estis fama kaj mi estis dankema pro mia rolo de venĝanto, kiun ŝi al mi atribuis. Ni estis kontentaj, mi tre, ŝi verŝajne ankaŭ.

Tradukis Jindřiška Drahotová

Nia klubo havas nun sian paĝon en Facebook. Bonvolu viziti ĝin kaj aliĝi: www.facebook.com/bulteno. Vi povos komforte sekvi ĉiujn novaĵojn.

Aktualaj informoj estas nature ankaŭ en nia paĝaro: <http://bulteno.cs-retromusic.net/>.

Inspektoro Jan Rádl en la servo de la Unua respubliko



El la nova libro de Marek Skřípský Případy inspektora Rádl – el la ĉapitro Ruĝaj pafistoj (jaro 1921):

En la gastejo Venenkabanaĉo estis gaja etoso kiel ĉiam sabatnokte. La tipa tumulto estis des pli intensa dank'al la varma aŭgusta vetero kiam kielajna aĉularo kaj loka krimularo venis al ŝatata gastejo fine de la varma tago. Tiu ĉi gastejo neniam havis bonan reputacion kaj plejmulto da ordinaraĵoj homoj prefere ne eniris ĝin. Krom tio, ke la gastoj konsistis el dubindaj uloj, ankaŭ la kelneroj ne apartenis al la honestaj homoj kaj ili scipovis lerte priŝteli tiujn gastojn, kiuj ne konis iliajn trukojn. Kaj pri almenaŭ baza pureco de gastejo oni prefere ne parolu. Iom malpli juna muzikisto kriaĉis tiel ke oni apenaŭ povis kompreni lian duan aŭ trian vorton. Por la ularo de la plenplena gastejo

tio ne gravis. En la fumplena salono oni gaje drinkis, negocis kaj flirtis kun putinoj. La salono estis de planko ĝis plafono plena kaj gastejestro Krajt ĝoje atendis altan profiton kaj buntan kromprofiton ĉar la lokaj fanfaronuloj dumsabate fajfis pri la pleneco de siaj monuoj. Sed hodiaŭ la granda nokto havos por la ularo malagrablan finon.

Proksimume unu horon antaŭ noktomezo ariĝis ĉirkaŭ Venenkabanaĉo nigraj kaskuloj senditaj de kelkaj policoficejoj. Polico de tempo al tempo venis al Venenkabanaĉo por detala serĉtrarigardo. La rezulto estis kutime ĝojiga – aro de forŝtelaĵoj, foje iu perŝteligilo kaj ne escepte ankaŭ serĉata persono. „Do, estimataj, ni ne plu atendu“, ekparolis antaŭ la gastejo Viktor Holas, la loka inspektoro de la polica gardservo, kiu estris la noktan polican trarigardon. „Tiuj kies tasko estas ekstera gardo, faru cirklon ĉirkaŭ la gastejo. Tiel neniu el la ena aĉularo povos forvaporigi. Jes, tieeeel ...“ kontente li enspiris, kiam parto de la nigraj kaskuloj dense ĉirkaŭis Venenkabanaĉon. „Nun, la resto rapide enen! Kaj ne estu superflue delikataj!“

La amuziĝo de la aĉularo estis subite rompita per rezoluta bato de la perpiedmalfermita pordo, per la akra sono de policfajfiloj kaj per la senkompromise kriitaj komandoj: „Polico! Ĉiuj ek kaj frunte al la muro! Rapidu, bestaro!“ La policano Bechtel rekte saltis al verŝotablo: „Krajt! Vi bovaĉo! Tuj elŝaltu la muzikon kaj montru sur tablo ĉiujn forŝtelaĵojn! Rapide, rapide ... aŭ ni fermos la gastejon!“ Bechtel akompanis sian delicpeton per uzo de gumklabo, por ke la gastejestro ne dubu pri lia peto. La policanoj estis spertaj. Dum momento staris la plejmulto de la aĉularo discipline laŭlonge de la muro kaj la

resto kuŝis, ĉemane katenigita. Nur kelkaj uloj sukcesis trasalti fenestron sed ekstere kaptis ilin la nigraj kaskuloj kaj faligis ilin surteren.

Policano Jaroslav Kotyza el malnovurba departemento en tiu ĉi tumulto rimarkis la konatan staturon el sia distrikto – poŝteliston kaj akapariston Ferda Kalina. Kalina reagis nekutime sagace. Fulmrapide li kaptis turisman sakon, kiu ĝis nun kuŝis subtable kaj traglitis malantaŭen direkte al la necesejoj. La vangoj de Kotyza sunbriletis kaj li diris al si mem: „Se li provus trarampi necesejan fenestron, li estos kaptita ekstere. Kaj se li volus kaŝi sin, mi persone trovos lin ... min interesus kiujn aĵojn enhavas lia sako. Ĝi ŝajnis esti sufiĉe granda.“ Kotyza kuris al la necesejo kaj premis la klinkon. Nenio okazis – la pordo estis ŝlosita. „Kia mensforto ...“ ridetis la policano ignoreme. „Tio respondas al Ferda ...“ Kalina!“ kriegis la policano intence forte. „Nome de la leĝo malfermu la pordon! Mi scias, ke vi estas tie! Alikaze mi trarompos la pordon kaj tio iĝus malplifavora por vi!“

Kiam la policano ne aŭdis ajnan eĥon, per forto li piedbatis la pordon, kiu vaste malfermiĝis. Ferda staris ĉe la neceseja pelvo, malantaŭ kiu li vane provis kaŝi la tro ampleksan sakon. „Do, ni iru, Kalina“ diris Kotyza modere. „Kaj prenu la sakon – unue, la pelvo ne kaŝos ĝin, sed ĉefe, mi vidis vin forkuri kun ĝi.“ La policano arestis ĉi poŝteliston jam kelkfoje kaj ankaŭ nun li ne atendis ajnan kontraŭstaron. Ferda nek estis ia spadistaĉo nek per sia korpa konstitucio superus la ŝultrolarĝan policanon. Ĉi-foje Kalina hezitis ekiri kaj krome lia mano malsuprenmoviĝis ĝis talio. Kiam ĝi ŝovetis la mallongan somerjakon, rimarkis surprizita Kotyza ĉe la talio de Ferda la mantenilon de revolvero. La instinktoj de policano vekiĝis kaj tuj li ŝovis la manon en la revolverujon por sia parteaŭtomata Steyr. Kotyza manipulis pafilojn pli bone kompare al lia neatendita kontraŭulo. Malgraŭ tio al Ferda sufiĉis nur puŝi revolversekurigilon de sia Nagant, sed la policano ankoraŭ devis tire tendi Steyr por funkciigi ĝin. La sekurigiloj de ambaŭ pafiloj klakis samtempe. Ambaŭ viroj celis unu al la alia de malpli ol duonmetro. „Kalina, manojn supren!“ muĝis forte, tamen iom timeme Kotyza. „Ĉesu stultumi kaj forĵetu la pafilon! De ĉi tie vi ne sukcesos fuĝi! Ĉu vi aŭdas min?! Forĵetu vian Nagant!“ La lastan frazon la policano ekkriis speciale laŭtege, ĉefe por atentigi siajn kolegojn en la salono de la gastejo, ke li frontas kontraŭ armita krimulo. Sukceso venis ... Ĉeporde tuj aperis aliaj du nigraj kaskuloj kun preparitaj pafiloj enmane.

Ferda ekkonsciis, ke se li ne emus heroe morti, ne estas ajna alia maniero ol ĉesigi la ludon. Plue, li rimarkis la kuraĝan vizaĝon de la juna policasistanto, kiu avide atendis eĉ la plej malgrandan kialon por ekpafo. Ferda taksis lin vere reale, ĉar la policasistanto Vrubeľ partoprenis sian unuan serĉtrarigardon kaj avidis aventuron. „Mi pafkaptos lin, sinjoro policano.“ Sed tio ne okazis. Kalina sekurigis la revolveron, kuŝigis ĝin sur parapeton kaj suprenlevis la manojn. „Bone, bone, mi rezignas, sinjoroj.“ Kotyza tujtuj ĵetis lin frunte al la muro kaj katenigis liajn manojn malantaŭen. En la salono nervoza policano vangofrapis la krimulon kaj intencis ripeti tion ankoraŭfoje, sed la ĉefpolicano haltis lin. „Kaptitojn vi ne rajtas bati,“ diris li senhezite. „Almenaŭ ne kiam ĉeestas atestantoj“, aldonis li flustre.

„Ho! Venu rigardi kio estas en la sako!“ vokis al la kolegoj la policasistanto Vrubel. „Sinjoro inspektoro, rapide venu!“ Tiun ĉasaĵon neniu en Venenkabanaĉo antaŭvidis. En la sako estis ĝuste dek revolveroj Nagant, tipo 1895, la samaj kiel tiu, kiun havis Ferda ĉe sia talio.

Tiu ĉi estis rusa revolvero, kalibro de 7, 62 milimetroj, produktita en Belgio antaŭ la jaro 1914, en la mondo kutime disvastigita paŭlo, entute solida. Iom eksterordinara pro tio, ke ĝi inkludis sep kartoĉojn kvankam plejmulte da ĉi-tipaj revolveroj estis ses-kartoĉaj. Ĉiuj revolveroj en la sako estis kartoĉ-ŝargitaj kaj krome, por ĉiu el la revolveroj estis aldonita skatoleteto kun pliaj dek kvar kartoĉoj.

„Hej homo“, turnis sin la inspektoro Holas al la katenita Kalina. „Kion damne signifas tio? Kaj kiamaniere vi akiris tiun ĉi paŭlaron? Ĉu vi aŭdas min? Do parolu!“ Ferda obstine flankenrigardis por eviti rigardi la policianojn. Lia rigardo glitis de pordo al plafono kaj poste al angulo aŭ al iu fenestro. Fine Kalina ekrigardis la teron: „Mi rifuzas atesti. Tio ja estas mia rajto“, diris li mallaŭte, sed firme. „Mi montros al vi, kion signifas ne atesti, vi bovaĉo!“ komencis kii je tuta salono la policano Kotyza. „Kion vi pensas pri ...“ „Tion li ĵetis en necesejpelvon“ interrompis la policanon junulo Vrubel kaj li svingis malsekajn manojn, en kiuj li tenis iun ruĝan kajereton disŝiritan je du pecoj. „Estis mia ideo rigardi enen, sinjoro inspektoro,“ klarigis la policasistanto. „Li volis forlavi la kajereton, sed tio ne eblis. Ĝi havas sufiĉe firman kovrilon, bonvolu rigardi.“ Holas prenis ambaŭ partojn kaj kunigis ilin. „Vi ne kredos, sinjoroj ...“ tio estas membrelegitimilo de la komunisma partio de Ĉeĥoslovakio – kun la nomo de Kalina.“

Kotyza ne kredinte skuis la kapon. Se io ne kongruis kun Ferda Kalina, estis tio politiko. Kalina estis simpla krimeca tipo kaj lia strebo koncentriĝis nur je mensesplorado kiel havigi monon kaj samtempe nenion fari. La rezulto de tiuj mensesploroj estis diversspecaj ŝteloj kaj etaj rompenŝteloj, foje vendo aŭ interŝango de ŝtelitaj aĵoj. Ĝuste pro tio Kalina estis konata al la policianoj de la malnovurba oficejo. Neniam li batalis kaj la uzo de paŭlo estis ĉe li ĝis hodiaŭ io absolute neimagebla.

„Sed kial li forĵetis sian legitimilon en necesejpelvon se la komunisma partio estas ekde ĉi printempo laŭleĝa partio?“ komencis pripensi Vrubel, kiu nun post tia eltrovo sentis sin kiel Sherlock Holmes. „Ni pro tio ne povus fari ion ajn al li.“ „Eble li ne volus, ke ni ligu lian membrecon kun tio, kion li havis en la sako,“ diris sinistre Holas kaj severe rigardis Kalinan. Sed Kalina nur ripetis: „Mi simple rifuzas atesti.“

„Vi havas grandan problemon, Kalina,“ substrekis la policano Kotyza. „Ĉu vi konscias, ke vi estas politika teroristo? Do, fino de la ludo, kamarado. De kie devenas la revolveroj kaj por kio vi intencis uzi ilin? Ho?“ „Mi rifuzas atesti...“

Tradukis Lucie Karešová

Jan Vodňanský kaj lia prelego pri la temo: difino de lito



El la libro „Chodící papíňák aneb Řeči u tabule“ (1997):

Lito estas malsimpla, konstruita materia korpuso, kiu kontraste al vivantaj ekzistaĵoj (*nevino, kuzinjo, ĉefo ktp.*) ne havas fonton de movado en si mem. Kun neostentativeco kaj silenta humila servemeco ĝi kuŝas sur la surfaco de la tero, kaj nome ekskluzive ige de la gravito. Ĉi-tiu neostantiva, silenta kaj humila servemeco, kun kiu lito prezentiĝas, kaŭzas, ke ĝian ekziston ni paradokse ekkonscias nur tiam, kiam ni havas ĝin en deficitita modo, tio estas kiam ni ne havas ĝin.

Estiĝo de lito kiel malsimpla, konstruita korpuso estas kondiĉita parte objektive, parte subjektive. Objektiva antaŭkondiĉo de lito estas materialo (*ligno, metalo, argilo ktp.*); ekzemple pinon oni povas rigardi kiel ebla estonta lito, do potenciala lito, sen ĝi samtempe ĉesu esti aktuala arbo, tamen se ĝi iĝos aktuala lito, oni ne povas tiun liton rigardi reverse kiel potencialan arbon.

Subjektiva antaŭkondiĉo de lito estas homo-kreinto kaj mastro de lito. Li kreas liton. Kial? Por ke ĝi servu al li. Kiel servas lito? En la difino estas necese transformi neklare intuitivan imagon en ĝeneralan kaj sktrikte sciencan terminaron.

La servo de lito en ĝia substanco (t.e. *en ĝia liteco*) estas duopa. Ĝenerala kaj speciala.

La ĝenerala servo de lito konsistas en ĝia kapablo servi al ripozo kutime pasiva, escepte aktiva, kaj nome ripozo de individuoj kaj tutaj kolektivoj, en pozicio horizonta escepte eĉ vertikala. Ekzistas ento, kiu estas en ĉi-tiu senco kaj nur en tiu-ĉi senco rilate liton inversa. Estas glitkurejo, kiu – kiel oni scias – ankaŭ servas al individuoj kaj tutaj kolektivoj por ripozo. Sed ĉi-tie temas pri ripozo kutime aktiva en pozicio vertikala, escepte horizonta. Kiel oni vidos, tiu-ĉi inversa ekvivalenteco ne signifas ekvivalenta origineco, eĉ ne sendependeco inter ambaŭ entoj.

La speciala servo de lito. Ĉi-tiu servo estis domaĝe traktita de la ĝisnuna monda scienco eĉ malpli ol la servo ĝenerala. En multaj kazoj la kialo estis, ke eĉ multaj tre famaj scienculoj de tutmonde konataj nomoj evitis tiun temon, aŭ estinte malliberuloj de la pruda moralo de la 19-a jarcento kaj temis pri skandalo aŭ ili rigardis ĉi-tiun temon taŭgan nur por liberaj, ĝenerale tiklaj konversacioj.

Ni tamen staras en la suverena tereno de la scienco kaj necesas diri, ke la nuntempa teoria scienco plene rajtas sen superflujaj skrupuloj, skandaloj aŭ pikantaj dusencoj kovri ankaŭ tiun-ĉi kampon de homa agado. Estas tiu servo de lito, en kiu lito funkcias kiel optimuma tereno por cel-orientita agado de kutime dumembraj teamoj, ĝenerale personoj de kontraŭaj seksoj, kvankam klinike estas priskribitaj ankaŭ diversaj eblaj esceptoj.

La celo de la menciita agado de tiuj teamoj estas reciproka saturado de bezonoj, kiuj origine estis animalaj, kiuj tamen estis dum ĝisnuna historio pli aŭ malpli kulturigitaj. Tio estas kutime erotikaj estecaj bezonoj de membroj. Tiuj bezonoj ne ĉiam estas egalmezure satigitaj ĉe ambaŭ partneroj, pro kio estiĝas instinktaj rezervoj, kiuj laŭ iuj teorioj kaŭzas amasigo de libido. Tio kreas energian fonton por scienca aŭ artisma kreado.

La cела orientiĝo de agado de menciitaj teamoj povas havi du substance malsimilajn modifojn. En la unua el ili la agado okazas por mallongtempa kontentigo de la teamo, ke ĝi havu realan historian sekvon, kiu superas kadron de homa intimeco.

En la dua modifo la agado estas praktikita tiel, ke ĝi la unuan modifon inkludas, sed esence transpaŝas ĝin. Kontraste al la unua modifo ĝi estas nome realigita respondece kun kreativa utiligo de popolaj kutimoj kaj naciaj specifecoj de ĉiu lando.

Ĉi tiel pli aŭ malpli frue venos longtempa efekto de kaŭzeca influo en formo de estiĝo de individuoj aŭ tutaj kolektivoj. Tiel estiĝitaj individuoj aŭ kolektivoj poste konstituas subjektivan antaŭkondiĉon por estiĝo de pluaj litoj – kaj konklude lito reproduktiĝas maldirekte – kontraste al pino, kiu reproduktiĝas direkte.

Ĉi tie oni vidas, ke spite la menciitan ekvivalentecon en inverso de uzo de lito kaj glitkurejo oni ne povas ambaŭ entojn konsideri egale originaj kaj sendependaj vidpunkte de ilia estiĝo. Kiel estas konate, ankaŭ glitkurejo havas sian objektivan (*ebena tereno, akvo, frosto aŭ artefarita fridiga aparato*) kaj subjektivan (*homo-kreinto kaj majstro de glitkurejo*) antaŭkondiĉon de estiĝo, grandmezure analogian al antaŭkondiĉo de estiĝo de lito. Tamen – kaj tion ni ne devas forgesi – homo, kiu estas subjektiva antaŭkondiĉo de estiĝo kaj de lito kaj de glitkurejo estiĝas kaj progresadas ĝenerale sur lito kaj ne sur glitkurejo. Pro tio glitkurejo reproduktiĝas simile kiel lito, sed ĝuste kaj denove nur pere de lito. Mi diras ankaŭ, ke koncerne sian estiĝon la glitkurejo estas funkcio de lito aŭ mallongigite ni simbole skribas:

$$G_k = F(\text{lito}):$$



Tradukis Tomáš Břicháček

Kofro malantaŭ la pordo

Sceneto skribita de Vladimír Dvořák por Televarieté. Li aktoris en ĝi kun Jiřina Bohdalová:

(Antaŭ la pordo staras granda plenplena kofro. Sur la pordo estas granda ŝildo Plecity (Ŝultra). Sur la kofro sidas sinjoro Plecity – en la jako kaj embarasita – Li. Venas sinjorino Žáčková – ŝi, en la manoj pretaj ŝlosiloj, en la alia mano vendo-sako. Ŝi kantas, ŝi haltas vidante la najbaron)

Ŝi: Bonan vesperon, sinjoro Plecity!

Li: Bonan, bonan, eĉ pli bonan, sinjorino Žáčková.

Ŝi: Kial vi sidas ĉi tie? Sur la kofro?

Li: Vi ĉion rimarkas, sinjorino Žáčková.

Ŝi: Mi jam scias. Via edzino ne estas hejme kaj vi forĝesis la ŝlosilojn?

Li: (ne respondas)

Ŝi: Eble vi estis en la deĵor-vojaĝo?

Li: (ne respondas)

Ŝi: Jes, jes, vi ne estis. Mi ja vidis vin matene en la lakto-vendejo. Eble vi volas ien veturi? Mi ja ne volas esplordemandi, sed kial vi sidas sur la kofro? Eble vi ne hastas.

Li: Mi tion diros al vi, sinjorino Žáčková. Mi venis normale el laborejo – kaj ĉi tiu kofro staris antaŭ la pordo.

Ŝi: Aha! Do tio ne estas via kofro?

Li: Ĝi estas mia kofro. Kaj en tiu kofro estas miaj aĵoj.

Ŝi: Kaj via edzino?

Li: Ŝi ne. Ŝi estas en la loĝejo. Okupita.

Ŝi: Se mi komprenas tion, sinjoro Plecity, ŝi volas sugesti al vi...

Li: Eble ŝi volas sugesti ion al mi, sinjorino Žáčková, sed ĉiuokaze ŝi forĵetis min.

Ŝi: Kiel tio eblas? Tian decan, honestan kaj laboreman homon? Kial?

Li: Eble temas pri nevenkebla rezisto, sinjorino Žáčková. Pasinttempe ŝi havis tre strangajn rimarkojn. Iumatene mi – nur pro bonhumoro – diris, ke kiam mi razos min, mi sentas min je 20 jaroj pli juna. Kaj ŝi diras: Ĉu vi povus razi vin iam vespere?

Ŝi: Tio ne estas ŝia afero, kiam vi razas vin, sinjoro Plecity. Aŭskultu, eble en tio estos iu alia viro!

Li: Ĉiu ja razas sin matene!

Ŝi: Ŝi certe havas iun, tiu via fragilulino. Ŝi perfidas vin kaj sopiras pri libereco.

(ŝi sidiĝas apud li sur la kofro) Justeco ne ekzistas. Mi estas fraŭlino kaj mi tute ne ĝojas pri tio. Ne estu malĝoja, František. Venu al mi por momento. Mi havas

la botelon de Maryša, ni faros kaptilojn por musoj... tio estas ŝerco... Mi havas la botelon de Maryša, ni faros kaptilojn por musoj... Ni faros kaptilojn por sorikoj, ni kantos koree. Mi estas Mařenka. Mi havas proponon. Se vi ne havas lokon, vi povas loĝi ĉe mi, František, kaj eĉ antaŭ la divorco. Mi ne zorgas pri klaĉoj. (Ŝi ekstaras). Damne, divorco! Divorco kostos multe.

Li: (ankaŭ li ekstaras): Mi ne estas malriĉulo, sinjorino Mařenka. Mi havas ĝirkonton, pri kiu mia edzino ne scias. Mi havas kelkmil kronojn tie. Ĉe mia frato mi kaŝis oron kaj mia edzino ankaŭ ne scias pri tio, ke mi kaptis tri duajn kaj du triajn lokojn en Sportka (loterio).

(La pordo malantaŭ li iomete malfermiĝas, el la mallumo aperas virina mano en roba maniko, ŝi prenas Plecity je kolumo kaj senkompromise entiras lin en la loĝejon. La pordo fermiĝas.)

Ŝi: (preskaŭ ploreme direkte al la pordo): Ĉu oni faras tiel? Subaŝkulti malantaŭ la pordo??!!!

Tradukis Pavol Petrik

Miloš Zeman kaj Václav Klaus en la infero *Prezidenta ŝerco*

Miloš Zeman ofte rakontas antaŭ publiko unu bonan ŝercon pri si mem kaj Václav Klaus. Jen la traduko de la ŝerco, precize kiel li rakontis ĝin la 4-an de marto 2015 en Domažlice:

Václav Klaus kaj Miloš Zeman venis al infero.

- Vi devas agnoski, ke la historieto bele komencas.

Kaj en la infero estis trono.

Kaj sur la trono sidis diablo.

Kaj antaŭ la trono, kiel la unua, venis Václav Klaus.

Kaj la diablo diris: „Václav Klaus, vi faris multe, multe da pekoj.“

Kaj jen, apud la trono de la diablo aperis terure malbela kaj maljuna virinaĉo.

Ŝi havis kvar mentonojn, dek ok verukojn, grizajn harojn, multe da sulkoj. Ŝi estis dika, malpura, malodoranta.

Kaj la diablo daŭrigas: „Kaj konsiderante, ke vi faris multe kaj multe da pekoj, mi kondamnas vin, por ke vi dum la tuta tempo de via senfina loĝado en la infero fikadu tiun ĉi virinaĉon!“

- Mi esperas, ke tie ĉi ne estas iu cenzuristo, kiu malpermesos al mi diri vulgarajn vortojn.

Nu, la virinaĉo kaptas Vaclavo-n Klaus-on kaj malaperas kun li en la profundaĵoj de la infero.

Kiel la dua antaŭ la diabla trono venis mi.

Kaj apud la diabla trono aperis Claudia Schiffer.

Kaj la diablo diris: „Claudia Schiffer, vi faris multe, multe da pekoj...“

Tradukis Jan Josef Pospíšil

Se mi eble ne revenus...

Jiří Karen

aŭgusto 1943

Karaj geonkloj,
dankon pro la letero, kiu ĝojigis min. Tre bele mi ĝu-legis. Ĝi plaĉis al mi. Vi skribas jam alimaniere, neniujn lamentadojn. Pro tio mi ĝojas. Vi havas rikolton, mi komprenas, laboro, laboro. Kaj mi ne povas helpi al vi. Ankaŭ ni ĉi tie laboregas, eĉ al necesejo ni nun ne povas iri. Ni strebas ĝisatingi tion, kion ni preterlasis. Sed ni ankaŭ scias konsili al ni. Iam tiam ni almetas ŝtonon al la transmisia rimeno. Jam longe la rimenaj transportiloj ne estas el ledo. Kiam disfibriĝas rimeno ĉe la rando, post momento krak! krak!, ĝi komencas kreviĝi, kaj antaŭ ol oni alportos kaj surfiksos novan, unu horo forpasos. Jam estas malmulte da valora materialo. Ni ne plu tajlas per diamantoj, sed per substituaj metaloj, sed tio ne havas la originan valoron. Fuŝaĵojn oni faras facile. Ni havas nun tian metodon, kiam la majstro tro furiozas, ni diras al li, ke la stangon li provu fari mem kaj konvinkiĝu, ke ni ne faras tion intence. Li tion jam solide ne scipovas, li ne faris tion jam longe, li timas, ke li kompromitiĝus antaŭ ni. Kaj tial ni defendas nin, kiel eblas. Jam eblas eĉ sablon ĵeti en maŝinon. Sed singardeme, tio estas danĝera ludo. Hodiaŭ post laboro oni kunigis nin kaj devigis nin marŝi al la ekzerckampo. Iu timis, ke oni povus envicigi nin en la Tod-organizaĵon; ĝi forigas ruinojn. Afero malagrable, danĝera, oni elfosas mortintojn kaj prokrastajn bombojn. Ĉe tio oni facile perdas la vivon. La alarmo montriĝis falsa. Jes, en la ekzerckampo parolis al ni iu ulo pri tio, ke la Regno gardas niajn hejmojn kaj vivojn, ke ni havas la devon labori honeste kaj altigi la rapidecon. Ĉiu opiniis: “Eniĝu en mian postaĵon.” Ludis muziko, ni devis kanti, bele energie, iun marŝon. Oni marŝis ĉirkaŭ la ludkampo, ĝi estis ornamita per flagoj. Fine ni devis akلامي Heil, al la venko de la Regno kaj la Gvidanto. Ĝi verŝajne ne estis tro entuziasma, laŭ tio rezultis la regalo, kiu estis al ni dekomence promesita. Malgranda kolbaso kaj peco da pano. Pardubský, kiu ĵus ricevis paketon kun pli bonaj aĵoj, nur ekgrimacis kaj donis la manĝaĵon al najbaro. Plejparte ni pensis: kiu nenion faras, tiu pri laboro parolas... Kiam ni venis hejmen, ni volis la jubileon prisoleni. Požárek volis promeni, li iris en la lavejon, knaboj alnajlis liajn ŝuojn al la planko. Ion mi volis kontraŭdiri, sed poste mi nur mansvingis. Ĉiuj atendis, kiel li insultos, sed li diris nenion, prenis el ŝranko lignoŝuojn kaj iris. Ili nome alnajlis lignoŝuojn miajn. Denove instruo: se oni faras friponaĵon al aliaj kaj vi silentas, povas la friponaĵo koncerni vin mem. Sed kiu senĉese protestus? Vi ekridas, nu ŝerco. La najloj min premas, ne plu eblas ilin el la lignoŝuoj forigi. Malagrable.

Hodiaŭ mi revenis el la skiplaboro kaj ni havis prunknedlojn. Kuiris Jarĉjo Kuchař kaj bone.

Kiam vi ion sendos al mi, do farunon kaj sekigitajn prunojn. Tolaĵon mi ne bezonas. Mi iradas sen ĉemizo, pro insektoj, ili tenus sin en faldoj. Tiamaniere eblas ilin pli rapide kapti. Ĉu vi havas ion sur la piedojn, malpli pezan? La lignoŝuoj min ĝene premas.

La knaboj el la Alta eble hejmen ne venos. Laŭdire la forpermesoj estas pro militaj kaŭzoj definitive haltigitaj. Denove instruo, ke tiu, kiu malfruiĝas, ricevas nenion. Mi havis bonŝancon. Via letero pri ŝtelisto, kiu enrompiĝis al vi, sed ne sukcesis, tre plaĉis al ĉiuj; legis ĝin ĉiuj ĉambranoj. Tio kostu lin multe, ne kompatu lin. La fumantoj fartas ĉi tie mizere, jam unu monaton kaj duonon ili ne estis porciumitaj. Oni diras, ke la kantino estis priŝtelita, sed oni ne diras, de kiu; ni bone scias, sed nenion diros.

- Tranĉilon mi havas, plendas Požárek, sed lardo mankas al mi.
- La kapon mi havas, sed mankas al mi la prudento, rimarkigis Rozinek.
- Lasu la filozofadon, admonas lin Dudek. Kiam vi filozofias, mallongiĝas miaj vejnoj.

Laĉjo

Tradukis Jiří Patera

Kuriozaĵo: Jára Cimrman kaj Einstein

En Olomouc Jára Cimrman havas sian straton tuŝapude de la strato de Einstein.



Dank' al www.mapy.cz oni povas ekscii, ke en nia lando ekzistas jam multaj stratoj nomitaj laŭ tiu ĉi genio.

El poemoj de Jana Cíhová-Hrdličková

Signo de ekkrio

*Al diablo! - kun ĉasteco,
titolata - honesteco!
Kia estas ĝi ja eco
kun ŝildeto de pureco,
kiu scias nur turmenti
instigante turmenti
kaŝan amon - puran koron
peli en infer-torturon.*

*Mi honeste vivis ĉiam
tamen: ĉu mi amis iam?
Ĉu feliĉis mi nur foje?
Restis sola mi survoje?*

*Ĉiam estis mi flatata,
ĉiam ie adorata,
ĉiam nur - alt-estimata,
sed - neniam - ve! - amata!*

*Ke ĉasteco mia krevu!
Mi sen la skrupuloj revu
foje nur feliĉon havi,
tiun Mian ame ravi.*

*Foje min la rev' forportu,
poste mi kontente mortu!*

Mi forgesis al vi diri

*Mi forgesis al vi diri,
ke mi ĉesas nun jam miri,
kial mia spiro ŝaltas,
se mi antaŭ vi nur haltas.*

*Mi forgesis jam dufoje
ĉeokaze - eĉ dumvoje
kiam eblis ne disiri
tion al vi fine diri:*

*Kiom belas la okuloj
viaj brunaj, jes! - Vi Ulo!
Ĉiam tiuj brunaj gajnis
kaj plej belaj ili estis;*

*Ke mi timas temon tuŝi,
la aferon pluen puŝi,
ke min tenas sindefendo,
Amo! - je la manetendo!*

*Ofte tenas mi enmane
poŝtuketon silkan. Brune
ĝi koloras. Ĝin mi ŝtelis
dum mi en kafejo sidis.*

*Rigardante la poŝtukon
vidas mi la brun-okulon!
Ĝin redoni? Ne, maleblas.
Min ĝojigi ŝi kapablas!*

*Ĉu ne stultas la virino
jam plenaĝa - "saĝa" - ino,
amon sian konfesante,
flamon ĝian - penbremsante?*

Stelo movigas monton

*Monto staras
kaj atendas...
Stelo brilas,
iam logas...
Nebulecan vivon
havas nur la Mont'.
Per radioj mildaj
Ĝin varmigas Stel'.
Monto staras
kaj atendas...
Stel' vojaĝas,
iam logas.
Nur sencelan vivon,
havas jen la Mont',
per radioj amaj
Ĝin influas Stel'.
Monto staras -
jam hezitas.
Stel' la manon
am-etendas...
Jam heliĝas vivo
de la trista Mont'.
Kion fari? Scias
Ĝi nun certe! "Stel'!"
Mont' ekpaŝis
senhezite,
de la Stel'
jam atendate.
Renkontiĝis Monto
kun la Verda Stel',
por kuniĝi arde
sub la Ammantel'.*

Amo

*Amo estas brakoj etenditaj
tener-tuŝi
bonvenige unu,
iujn filantrope.*

*Amo estas la manplato
preĝsimile sin kro anta
al la kokso sveltalia;
adortuŝo timoplana,
fajniĝinta la pasio
pro pektuŝoj pentofaro.*

*Amo - buŝo, lipoj diras:
ni pri kiso ĝemsopiras,
pri la rido, belo, bono,
pri ekstazo kaj la kono.*

*Amo - de la kap' renverso.
Amo - en virin' korpigo,
de kandela bril' ekflamo
de kruela vort' estingo.*

*Enamiĝe mi ĝin vidas kiel mondon
tre malvastan cirklon, rondon,
kie en feli' senfina
regus la belec' virina,
kie estus loko pure -
nu! - por Vi kaj Mi nurnure!*

La Esperanto-stratoj en Prago

Jiří Patera

En Prago troviĝas stratoj, kiuj portas la nomojn de esperantistoj:

Zamenhof-strato (ĉeĥe *Zamenhofova*), ĝi situas en la praga kvartalo Štěrboholý,

Ginz-strato (*Ginzova*) troviĝas en la kvartalo Záběhlice. Ĝi estas nova strato, kiu la nomon ricevis post la eksplodo de kosmoŝipo Columbia en la 2003-a jaro; pri la esperantisto Petr Ginz aperis artikolo en la pasinta numero de nia Bulteno.

S. K. Neumanna estas strato en la kvartalo Kobylisy. La ĉeĥa poeto S. K. Neumann estis inter la fondintoj de nia Esperantista Klubo en novembro 1902.

Martin Benka-strato (*Benkova*) troviĝas en la kvartalo Chodov. M. Benka estis elstara slovaka pentristo kaj grafikisto, nacia artisto. Li estis esperantisto kaj postlasis multajn priesperantajn desegnaĵojn kaj ankaŭ E-lingvajn artikolojn. Lia busto troviĝas sur la domo n-ro 1178/49 en Mánes-strato, kie li loĝis inter la jaroj 1910-39.

Karel Höger-strato (*Högerova*) troviĝas en la kvartalo Barrandov, kie multaj stratoj portas la nomojn de ĉeĥaj aktoroj. K. Höger estis eminenta teatra, filma, televida kaj radia artisto. Li partoprenis en la E-lingvaj radio-elsendoj de „Verda Stacio“ antaŭ la dua mondmilito el Brno kaj post la milito el Prago.

Jarmila Kurandová-strato (*Kurandové*) estas en Barrandov. J. Kurandová samkiel K. Höger partoprenis en la E-lingvaj elsendoj; en ĉeĥa filmo ŝi prezentis Avineton de B. Němcová.

Jiří Fr. Chaloupecký-strato (*Chaloupeckého*) situas antaŭ la granda stadiono sur Strahov. Chaloupecký estis tiama elstara korpeduka funkciulo, membro de la soci-demokrata partio, en 1911 li fondis Laboristan unuiĝon esperantistan kaj multe laboris por Esperanto. Sed post la publikigo de Ido li fariĝis idisto, aniĝis al la komunista partio kaj nur tre frua morto (li forpasis 32-jara) malebligis al li pluajn ŝanĝojn de opinioj.

Jiří Karen-parko (*Park Jiřího Karena*) troviĝas en la kvartalo Žižkov. La ĉeĥa poeto Karen estis esperantisto, li verkis originalajn E-lingvajn poemarojn, aliaj liaj ĉeĥaj verkoj estis E-igitaj de pluaj E-poetoj.

Vela Peeva-strato (*Pejevové*) estas en la kvartalo Modřany, kie multaj stratoj rilatas al Bulgario (ekz. stratoj de Botev, Vapcarov, Mladenov k. a.) kaj sekve unu portas la nomon de la juna bulgara esperantistino kaj kontraŭfaŝista batalantino. En batalo ŝi perdis sian vivon, sed post la milito ŝia naskiĝvilaĝo Ĉepino estis kunigita kun aliaj apudaj vilaĝoj kaj tiel estiĝis distrikta urbo, kiu ricevis la nomon Velingrad, t. e. Urbo de Vela. Ni estas fieraj, ke ankaŭ la praga strato portas la nomon de la elstara bulgara esperantistino.

La tilio de saĝeco¹

Věra Ludíková

Antaŭ kelkaj jaroj mi ekkonis la majestan komunumon de homoj, apartenantaj al la Ĉeĥa Konferenco, kiu aspiras edifi la ĉeĥan socion kaj serĉas elirsolvon el la sorĉa cirklo de neelirebleco kaj sento de la ĉeĥa senambiciemo. Tio estas penado urĝe bezona. Nome ŝajnas, ke ĉesas validi moralaj valoroj kaj la demando de la hodiaŭo estas kiel haltigi ilian devaluton. En tiu ĉi spirito kaj kun tiu ĉi celo okazas la hodiaŭa renkontiĝo.

Ni ĉiuj estis ĝis antaŭnelonge trankviligitaj per la imago, ke ĉe ni en Eŭropo okazas nenio malbona kaj la vorto „milito“ sonas kiel io tre malproksima, sed ni estis elkondukitaj el la eraro. Ankaŭ en nia malnova bona Eŭropo ekscitiĝas la tendenco malami, fortiĝas la klopodo regi aliajn, eĉ mortigi kaj venas la vico de terorismo en sia tuta makabra aspekto.

Ĝuste nun ni estas atestantoj de fenomenoj, kiuj deskuas niajn ĝisnunajn certecojn. Ilia tempo finiĝas kaj ŝajnas, ke ne plu validas internaciaj interkonsentoj, ke ne validas la leĝo, ke ne validas, ke la limoj estas neleĝe netranspaŝeblaj. Estas evidente, ke la homoj devus konstante aŭdi esperigajn vortojn, tiajn, kiaj alportas lumon kaj esperon kaj la homon ili bonmorigas.

Ne nur persone ni trairas ekzamenojn, kiuj fortigas nin, se ni ilin sukcese trapasas, sed trairas ilin la tutaj nacioj. Unu el la sorto-ekzamenoj de nia nacio estis la katastrofaj sekvoj de la batalo sur Blanka monteto, kiuj montras al ni, ke eĉ el la malespera situacio ekzistas vojo, kiu povas evoluiĝi eĉ neatendite bone, kiel tio okazis per la proklamo de la sendependa Ĉeĥoslovakio en la jaro 1918, certe sub la kondiĉo, ke oni nur senage ne rigardu kaj samtempe en la ĝusta tempo aperas sur la scenejo gvidaj personoj. Se ni retrorigardas la ĉenojn de la eventoj, akompanantaj nian historion, ni povas nur miri kaj senfine miregi, kio ĉio kreis nian nacian karakteron, nian nacion. Valoras ne cedi al skeptiko, sed prave levi la kapon kaj esti fiera ĉeĥo. Ni do ne lasu nin fortimigi! La socio ne rajtas akcepti la timon kiel normon!

Ŝanĝi la socion miaopinie estas dume superhome, precipe se ni volas la ŝanĝon senprokraste, ĝuste nun tuj, sed tio ne signifas, ke ni ne povu ion ŝanĝi. Estas grave scii pri la alternativo al la vivo rimarkinde materiala, kiu estas ĉirkaŭ ni, nome pri la vivo pli spirita. La materiala kontentigado ne rajtas esti nia celo, ĝi devas esti nur la rimedo por la harmonia sencoplana vivo. Komprenoble ni mem devus vivi ekzemplodone, ni devus esti modelo por aliaj, ni mem devus havi solvitaj la konfuzojn en la animo, por ke ni povu fariĝi veraj lumportantoj. La homoj antaŭ ĉio devas estimi sin mem.

La tuta socio nenegeble ŝanĝiĝos, se ĝi akceptos ŝanĝitajn valorojn, se ĝi respektos homojn ne laŭ diosciaska posedaĵo, sed laŭ la valoroj spirita. La ŝanĝoj devas veni de homoj, kiuj en la vivo ion sukcesis. Ni devus mem al tiu ĉi ŝanĝo kontribui, ĉar ĝi ne okazos de si mem. Estas nia devo decidiĝi, kiun ni estimas, al kiu ni tenas respekton, al kiu ni volas simili, en kiu ni vidas modelon

¹ Prezentita en la Ĉeĥa Konferenco en Kutná Hora la 11-an de aprilo 2015.

– kaj memkompreneble tion evidentigi sen grandaj vortoj kaj gestoj kaj en tiu spirito agadi. Nome ĉion per mono oni aĉeti ne povas, eblas aĉeti nek honoron, nek kredindecon.

Kiajn valorojn ni devas aprezi, al kiuj ni devas kroĉi la esperon? Ŝajnas, ke la altaj moralaj valoroj de niaj granduloj estas jam parte forgesitaj, ke multaj estas eĉ tute forgesitaj... Ĝuste la parte forgesitaj valoroj – la scio de propra valoro, de bela lingvo, kia la ĉeĥa sendispute estas, la belega ĉeĥa lando, kiun por ni la antaŭuloj venke defendis, kaj ni ja ne volas ĝin forlasi, la memrespekto, la sprito propra al ĉeĥoj (eĉ kun iom da ŝvejkado), sed ĉefe la kreemo – tio estos la plej gravaj principoj en la mondo, kiu fariĝas globala.

Ni estu atentemaj al elekto de tiuj, kiuj ricevas la jurpovon por regi nin. La gravajn aferojn devus decidi la homoj kun vasta horizonto, la homoj edukitaj, moralaj kaj saĝaj, por ke ne plu estu duboj pri tio, ke nia civilizacio ne celas al sindetruo.

Ni havas al niaj antaŭuloj, al niaj granduloj grandan devoligon, sed ankoraŭ pli grandan devoligon ni havas al niaj posteuloj kaj al nia belega lando. Ilia heredo devoligas nin leviĝi el senambiciemo, el kverelemo kaj el ĉio, per kio oni nuntempe estas tedigataj. Ni kredu al ni, ke tiujn heredojn ni kapablos plenumi! Gvidataj de sopiro konservi la vivon sur la Tero ni gvidas lukton kontraŭ la fortoj de detruado. Gvidataj de vizio de bona estonteco kaj certaj pri la granda amo de Dio, venke defendis sin la okcidentaj kristanoj, niaj pratempaj antaŭuloj, kontraŭ la arabigo de la eŭropa tereno, ili defendis sin kontraŭ pluaj kaj pluaj insidoj. Gvidataj de sopiro konservi la homecon ĉiuokaze kaj fortigi ĝin ĝis dimensioj spiritaj, ni devas nian nuntempon submeti al tiuj ĉi esperoj kaj por tiuj ĉi esperoj lukti...

La animo kaptas foran eĥon el la Universo,
la memoron de ĉiuj senmortaj animoj.
La Universo per homoj pleniĝas,
sed nur per tiaj, kiaj ekkonas,
ke ĝuste ili, pli spiritaj,
estas ĝiaj sencoj kaj esperoj...

Tradukis Jiří Patera

La blazono de Prago

Jiří Patera

Malmultaj urboj de la mondo povas fieri pri tiom abunda blazono kiel Prago. En ĝi respeguliĝas la riĉaj historiaj eventoj, kiuj okazis en la urbo. Ĝi estas blazono historia, formita en la spirito de heraldiko.

Ĝian estiĝon kaj originan aspekton oni devas serĉi en la fora historio. Jam en la 11-a kaj 12-a jarcentoj sur la teritorio de la nuna Prago troviĝis diversaj komunumoj, el kiuj la plej gravaj estis la Malnova Urbo (Staré Město) sur la dekstra bordo de la rivero Vltava, la Malgranda Urbo (Menší Město, poste Malá Strana) kaj Burg-Urbo (Hradčany) sur la maldekstra bordo de la rivero.

En la jaro 1264 skabenoj de Malnova Urbo sendis al Břevnov-monaĥejo dokumenton, kiu portas la plej malnovan sigelon kun bildo de tri turoj. En la bavara burgo Wenzelsburg en la vilaĝo Lauf konserviĝis kavalir-salono ornamita per vico da ĉefaj blazonoj urbaj, ekleziaj kaj personaj, kiujn pentrigis ĉi tie en la jaroj 1357-1360 reĝo Karolo IV. Inter aliaj troviĝas ĉi tie ankaŭ la blazono de la urbo Prago, aparte indikita kiel la blazono de Prago; en la blazono el arĝenta murego sen pordego kreskas triopo de arĝentaj turoj kun krenelaro, la meza turo estas iom pli alta kaj larĝa ol ambaŭ flankaj turoj. Tio estas la plej malnovaj dokumentoj pri la praga blazono.

En la jaro 1348 reĝo Karolo IV. fondis Novan Urbon (Nové Město), kiu kune kun la tri malnovaj urboj de Prago dum jarcentoj vivis unu apud la alia memstare kaj ĉiu el ili havis propran blazonon ĝis la jaro 1784, kiam imperiestro Jozefo II. kunigis la urbojn en unu urbon Prago kaj en la postaj jarcentoj al la urbo estis aligataj pluaj apudaj urboj, la Juda Urbo (1851), Vyšehrad (1883), Holešovice-Bubny (1884) kaj Libeň (1901).

La blazono de Prago estis la origina blazono de Malnova Urbo: ĝi estis ruĝa ŝildo kun arĝenta murego kun krenelaro kaj pordego, super la murego leviĝis tri arĝentaj turoj, la meza kun groptegmento kaj la flankaj kun pinta tegmento kaj kun turglobetoj.

En la jaro 1462 la malnovurbanoj gvidataj de reĝo Georgo de Poděbrady helpis milite al imperiestro Frideriko III. kontraŭ la aŭstra nobelaro kaj la ribelema Vieno kaj pro tiu ĉi helpo ili ricevis jenan blazonan plibonigon: la turoj kaj murego escepte de la krenelaro estis de tiam desegnitaj orkolore, super la ŝildo estis lokita helmo kun ruĝa-blanka lambrekino kaj ora imperiestra krono inter du reĝaj ĉefaj leonoj kiel ŝildotenantoj.

Pro helpo dum defendado de Prago kontraŭ svedoj en la jaro 1648 la urbo ricevis de Ferdinando III. pluan plibonigon de la blazono en formo de arĝenta armita branko en la malfermita pordego kiel simbolo de kuraĝo kaj braveco. Samtempe la nombro de helmoj estis grandigita al tri, super la mezan helmon estis lokita dukapa imperiestra aglo kun oraj inicialoj FIII surbruste kaj super la flankaj helmoj estis po ses standardoj de la urbaj armitaj korpusoj. La blazonon tenis du arĝentaj du-vostaj leonoj kaj ĉirkaŭe estis dismetitaj lambrekinoj pendantaj de sur la helmoj.

En la jaro 1918 Prago fariĝis la ĉefurbo de la nova ŝtato Ĉeĥoslovakio kaj el la blazono de Prago oni forigis ĉiujn simbolojn de la Habsburga regado: la

habsburgan aglon kaj la imperiestran kronon. Sed konservitaj estis ambaŭ blazon-gardantoj kaj ankaŭ la armita brako en la malfermita pordego sur la ŝildo, ĉar la blanko restis simbolo de kuraĝo kaj braveco de la pragaj loĝantoj ankaŭ dum la unua mondmilito. Nove oni metis en la blazonon tilian branĉeton, simbolon de la liberigita ŝtato; sur la branĉeto staras ambaŭ ŝildoportantoj kaj ĝi estis ĉirkaŭvolvita rubando kun la devizo „Prago, la patrino de urboj“. En la krono super la meza helmo estis lokita kreskanta dekstren rigardanta arĝenta ĉeĥa leono kun la korŝildeto de Slovakio kaj en la kronojn de ambaŭ flankaj helmoj anstataŭ la standardoj de la urbaj korpusoj estis enŝovitaj standardoj de la unuigintaj pragaj komunumoj (kvartaloj). Ili estas vicigataj tiamaniere, ke sur la antaŭa loko estas la standardoj de la originaj ok pragaj urboj kaj post ili laŭalfabeta ordo la standardoj de la dek nove aligitaj komunumoj.

Alterne en la direkto de la maldekstra kaj dekstra heraldika flanko la standardoj portas jenajn kolorojn:

- Malnova Urbo – ruĝa, flava, blanka
- Nova Urbo – flava, ruĝa, blanka
- Malgranda Urbo – blanka, blua
- Hradčany – blanka, blua
- Juda Urbo – flava kvinpinta stelo sur ruĝa kampo
- Vyšehrad – flava, blua
- Holešovice-Bubny – blanka, ruĝa
- Libeň – ruĝa, blua, blanka
- Břevnov – blanka, blua, blanka, blua
- Bubeneč – blanka, ruĝa
- Karlín – blanka, ruĝa
- Košíře – blanka, blua, flava
- Nusle – blua, verda, blanka
- Smíchov – blanka, ruĝa, flava
- Královské Vinohrady – blanka, ruĝa, blanka, ruĝa
- Vršovice – blanka, ruĝa, blua
- Vysočany – blanka, ruĝa, verda
- Žižkov – blanka, verda, ruĝa.

Inter la 18 stangoj de tiuj ĉi standardoj estis lokitaj pluaj 27 stangoj de komunumoj, envicigitaj tiam en la ĉefurbon kaj malhavantaj proprajn standardojn. Decas aldoni, ke la koloroj de la praga urba standardo estas flava kaj ruĝa; ili aperas en la blazono ankaŭ en la ruĝa-oraj lambrekinoj.

En la tempo de la germana okupacio kaj de la dua mondmilito la blazono de Prago estis limigita nur je la fundamento, do la ŝildo kun la murego, pordego kun armita brako kaj turoj, la ceteraj partoj ne estis uzataj. Tiu ĉi aspekto konserviĝis post la liberigo de Prago en la jaro 1945 kiel la t.n. malgranda blazono, uzata dum la ordinaraj okazoj, sed por solena uzado estis renovigita la antaŭmilita blazono.

En la jaro 1960 Ĉeĥoslovakio estis proklamita socialisma respubliko, kio respeguliĝis ankaŭ en la ŝanĝoj de la blazono de Prago. La ĝistiam kronhava ĉeĥa leono, kreskanta el la krono de la meza helmo, estis anstataŭigita per leono

sen heraldika diademo kun nova korŝildeto de Slovakio, super la leono ŝvebis ruĝa ore borderita kvinpinta stelo.

Post la falo de komunismo kaj post la fordividiĝo de Slovakio la blazono de Prago nun aspektas jene: Ŝildo ruĝa, en ĝi ora murego kun arĝenta krenelaro kaj tri oraj turoj kun grandaj arĝente kadritaj fenestroj; la meza turo havas groptegmenton kaj ambaŭ flankaj turoj pintan oran tegmenton kun turglobetoj; en la murego malfermita nigra pordego kun levita krado kaj du-ala ora pordego; el la maldekstra rando de la pordego elstaras arĝenta armita brako kun etendita arĝenta glavo kun ora mantenido. Sur la ŝildo tri turniraj helmoj kun krono kaj ruĝa-oraj lambrekinaj; la kreston de la meza helmo prezentas arĝenta dekstren rigardanta du-vosta leono kun reĝa diademo surkape; la flankaj helmoj portas ĉiu po 9 stangoj kun standardoj de la pragaj urboj (kvartaloj), inter ili estas ŝovitaj 29 stangoj de pluaj pragaj komunumoj. La ŝildon tenas du kronhavaj arĝentaj du-vostaj leonoj starantaj sur tilia branĉeto kun folioj, la branĉeto estas ĉirkaŭvolvita per ruĝa rubando kun oraj literoj de latinlingva devizo: „Praga, la ĉefurbo de la respubliko“.





B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantického svazu

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7